



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 1 2022

MALPERMESITA EN USONO AĈETO DE ELDONEJO FARE DE ALIA ELDONEJO

La pasintan 31an de oktobro, juĝistino en Vaŝingtono (Usono) akceptis la malpermeson de aĉeto de la libro-eldonejo *Simon & Schuster* fare de *Penguin Random House*, dekretita de la usona administracio. Ĉi-foje la kialo de tiu malpermeso ne baziĝas sur la deziro protekti la lastajn aĉetantojn de la produktoj, sed la verkistojn. Tiel, laŭ konsidero de la usona administracio, la elstara loko okupota en la merkato de tiu ebla nova eldonejo povus damaĝi rajtojn de la verkistoj, kiuj devus marĉandi de malplibona situacio rilate anticipatajn tantiemojn.

Nuntempe, en Usono kvin eldonejoj kontrolas preskaŭ la tutan eldonan industrion. Se oni permesas al unu el ili aĉeti alian el la kvar ceteraj entreprenoj, la regado de tiu nova eldonejo en la industrio estus preskaŭ absoluta.

Advokataro de *Penguin Random House* apelacios kontraŭ tiu juĝo. Laŭ ili, la rajtoj kiuj devas esti unue protektataj estas tiuj de la lastaj konsumantoj de la libroj, tio estas la legantoj kaj, sendube, nova forta eldonejo povus pliefikigi la disvastigon de libroj kaj



eĉ malaltigi ties prezojn. Tamen, usona administracio asertis, kaj tio estas konfirmita pere de tiu ĵusa juĝo, ke tiu nova eldonejo damnus la negocan konkuradon. Ĉi tio sendube malpliigus la nombron da libroj eldonitaj, do, ankaŭ historioj rakontataj kaj ideoj proponataj ene de ili, tiel socio havus grandan damaĝon.

Unu el la atestantoj prezentitaj de la usona registaro dum la jura proceso estis la fama verkisto Stephen King. La aĉetota entrepreno eldonas siajn librojn, tamen li atestis kontraŭ tiu aĉeto. S-ro King asertis, ke novaj verkistoj havus grandajn problemojn dum la diskutoj pri ricevota pago de sia laboro, pro la fakto, ke la decido pri la mono ricevota antaŭ la vendado de la libroj dependus nur de unu el la flankoj en la negocado, tio estas, de la nova kaj forta eldonejo.

Vorto de la Semajno

Avizo:

1. Afiŝo, etikedo, slipeto kaj simile, sciiganta al la publiko utilan informon aŭ instrukciojn.

2. Korespondaĵo, per kiu oni sciigas al iu, ke ties sendaĵo atingis la celon

Avizi: Informi per avizo.

Sinonimoj: *Averto, informo, sciigo.*

La administracio disdonis avizon pri la danĝero uzi medikamentojn sen kontrolo.



Jam Unujaraĝa!

Jura Semajno atingas, okaze de ĉi tiu numero, sian unuan jaron da eldonado. Pro tio ni dankas kaj salutas ĉiujn niajn legantojn.